



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2006 numero 4-a: oktobro



Fotis Stefano Keller.

**Stefano Keller kaj Nicole Margot  
respondantaj al demandoj de vizitantoj  
en la esperanto-stando ĉe la foiro Comptoir de Lausanne.**

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,  
CDELI, Biblioteko de la Urbo,  
CH-2303 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch)

Tel. : ĉe CDELI : 032 967 68 55  
hejme: 032 926 52 32

### Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz,  
Stefano Keller, Andreas Künzli,  
Richard Schneller

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

**2006-5: novembro-decembro:**

oktobre 15.

**2007-1: januaro-februaro:**

decembre 15.

**2007-2: marto-aprilo:**

februare 15.

**2007-3 : majo-septembro :**

aprile 15.

**2007-4 : oktobro :**

septembe 15.

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.esperanto.to/ses](http://www.esperanto.to/ses)

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,  
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :  
032 932 18 88.

Retpoŝto : [mireille-grosjean@rpn.ch](mailto:mireille-grosjean@rpn.ch)

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF  
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto: [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,  
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.

Retpoŝto: [stefano.keller@kontakto.info](mailto:stefano.keller@kontakto.info)

Hans-Werner Grossmann, kasisto,  
Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
Muttensz 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: [esperanto-servo@bluewin.ch](mailto:esperanto-servo@bluewin.ch)

Bruno Graf, membro, Jurastrasse 23,  
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.

Retpoŝto: [bgraf.o@bluewin.ch](mailto:bgraf.o@bluewin.ch)

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	



# Svisa kalendaro

## Oktobre

- 2 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 3 : Genève: Stelo-Kunveno kun Anita Altherr
- 4: Luzern : LES : ĉe ges-roj Rey.
- 14-15 : Zürich : ESZ & SES : Orientsvisa Esperanto-Kulturrenkotiĝo.
- 15 : Zürich : ESZ : Familia migrado.
- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 21 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.
- 28 : Basel: ESB : Prelego de Hans-Peter Senn.

## Novembre

- 1 : Genève : Publika Konferenco de Claude Piron
- 4 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 6 : Lausanne : LES : Kunveno.
- 7 : Genève : Stelo-Kunveno kun D. de Mestral
- 8 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
- 8 : Wil : EKW : Raporto pri la UK.
- 16 : Vevey : Invito de la Fotila Muzeo.
- 18 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.
- 23 : Basel : ESB : Invito ĉe Hans-Peter Senn.

## Decembre

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 5 : Genève : Kunveno de La Stelo.
- 6 : Luzern : LES : ĉe ges-roj Rey.
- 6 : Wil : EKW : Fondua vespero.
- 8 : Zürich : ESZ : Zamenhofa Festo.
- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 17 : Lausanne : LES : Zamenhofa Festo.

## Januare 2007

- 3 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
- 20 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.

## Februare

- 3 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 17 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.

## Marte

- 3 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
- 17 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.

## Aprile

- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 17 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.

## Maje

- 5 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.

## Junie

- 16 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.

## Aŭguste

- 4-11 : Jokohama : 92-a Universala Kongreso.

## Septembre

- 15 : Redakta datlimo de *SES informas*.

-oOo-

# Vivo de SES

**La oktobra agotago fariĝis en Svislando  
septembra agotagdeko.**

**Sukcesa informado pri esperanto  
en la nacia foiro *Comptoir Suisse* en Lausanne  
de la 15-a ĝis la 24-a de septembro**



Fotis Stefano Keller

## **Mireille Grosjean kun informiĝemaj interesatoj**

La foiro « Comptoir Suisse » estas la plej granda nacia foiro okazanta ĉiujare en Lausanne. La temo de la ĉijara 87-a ekspozicio estis :

*Développement durable*

**Daŭropova evoluo  
futuro de la planedo.**

La foiro ricevis entute 280'000 vizitantojn el tuta Svislando.

Por la unua fojo esperanta organizo estis inter la ekspoziciantoj: Svisa Esperanto-Societo ĉeestis en la speciala ekspozicio de la foiro: *C'est beau la vie...? - Ĉu belas la vivo...?* kadre de la temo komunikado.



Nicole Margot diskutas kun EPFL-profesoro

La evento komenciĝis vendrede la 15-an de septembro. SES ricevis lokon en la parto de la ekspoziciejo, kiu estis rezervita por societoj kunlaborantaj en la realigo de tiu speciala projekto. Nia budo malgrandis, sed ni estis la solaj, kiuj havis deĵorantojn en tiu parto de la labirinte serpentuma vizitvojo.

La personoj el la arego de preskaŭ tricentmil vizitantoj de la foiro, kiuj decidis informiĝi pri la problemoj de nia tero, de ties loĝantaro kaj futuro, eniris la labirinton kun komputila identigilo enmane. Laŭvizite ili devis decidi pri agoj, konduto tra sia vivo kies naskiĝlokon difinis hazarde la

komputila ludo pretigita far studentoj de la Laŭzana Universitato.



Junaj vizitantoj aŭskultas la diskutojn.

Survoje ili renkontis enmurajn ekranojn, kiuj prezentis diversajn filmetojn ripetiĝantajn senhalte dum la tuta tago. Inter tiuj troviĝis, en angulo pri komunikado, filmeto prezentanta esperanton.



Mireille Grosjean diskutas kun pedagogoj


Antaŭ atingo de la elirejo, la ludantoj-vizitantoj povis renkonti niajn deĵorantojn ĉe la ekspoziciejo de informiloj, apud granda surmura afiŝo pri **Esperanto kaj SES.**

Elirinte, la vizitantoj ricevis printitan diagramon kaj informojn pri la efikoj de siaj agoj al la tero kaj al ties loĝantaro dum la simulita vivperiodo.



Stefano Keller dum diskuto kun la publiko

Estis tre bona decido partopreni tiun specialan ekspozicion, anstataŭ havi budon inter kaserol-vendantoj kaj komercistoj de ĉiopova polvo-suĉilo, ie en alia angulo de la grandega foiro.



Vizitanto tre atente dokumentiĝas

Tiel ni ricevis la viziton de la bonaj personoj, de tiuj, kiuj estas mense malfermitaj kaj serioze interesiĝas pri la

hodiaŭaj problemoj influantaj nian tre proksiman futuron. Meznombro po inter 10-20 serioze interesiĝantaj personoj venis al ni tage por paroli pri esperanto. Sed entute estis multe pli da vizitantoj, kiuj almenaŭ ricevis la bonajn informojn de kompetentuloj pri la Lingvo Internacia.




Konklude al interesa kontakto pri esperanto

Laŭtparolile disaŭdigataj diskutrondoj pri diversaj temoj, problemoj ligitaj al la daŭropova evoluo, same havis siajn alparolantojn esperantistajn:

- a. Per la ĉeesto de Nicole Margot, redaktantino de *Etnismo*, en tiu pri tutmondigo kaj egaleco ;
- b. Per la kontribuo de Stefano Keller, sekretario de SES, en la debato pri interdependeco kaj pri ekapero de rifuĝintoj pro klimataj ŝanĝiĝoj.

La publiko de tiuj konversacioj povis ekscii pri la agadoj de esperantistoj en tiuj kaj najbaraj kampoj kaj konvinkiĝi pri la realeco kaj funkciado de la esperanta mondo.

La prelego, dum kiu Mireille Grosjean, kunprezidantino de SES, prezentis esperanton pere de vortoludo, same altiris aŭskultantojn en la forumojn, ĉe la enirejo de la speciala ekspozicio. Entute oni povis observi, ke iĝis afero tute natura kaj normala aŭdi aŭ paroli pri esperanto en la foiro.



Mireille Grosjean dum debato

Diversaj tekstoj, informiloj kun religoj, unua leciono de la perkoresponda kurso, la DVD Esperanto Elektronike, muzik-KD kaj esperantaj periodaĵoj estis donacitaj al interesiĝantoj.



Nancy Fontannaz kun intereso

Kontaktoj kreigis kun pluraj instruistoj, universitataj profesoroj, studentoj, gejunuloj kaj aliaj personoj el plej diversaj profesioj.



Arlette Di Vetta kaj Nicole Margot ĉe la esperanto-budo je la servo de la vizitantoj

Eĉ lokaj politikistoj haltis ĉe nia budo por pozitive interparoli pri esperanto. Ekĝermis projektoj pri kunlaboro kun evoluhelpaj organizoj, kiuj invitis nin al siaj kunvenoj por paroli pri esperanto. Baldaŭ ni kunidos kun studentoj de la altlernejoj EPFL kaj UNIL, por diskuti kunlaboron pri traduko de ilia informmaterialo. Unu el la profesoroj renkontitaj dum la agado, jam eklaboris kun ni pri projekto enkonduki instruadon de esperanto en liaj instituto kaj kursoj altlernejaj.

En la spirito de interdependeco, la speciala ekspozicio estos prezentata ankaŭ en aliaj urboj kaj landoj por atentigi ankaŭ aliloke pri la neceso ŝanĝi nian konduton, por agi kune favore al la tero kaj al la tuta homaro. La respondecoj de tiu projekto antaŭvidas eĉ ĉeeston de la speciala ekspozicio en venonta Universala Kongreso de Esperanto!

Prelegoj kaj ekspozicio pri indiĝenaj problemoj (Amazonio) okazintaj samtempe kadre de la ĉijara "Comptoir", permesis al ni krei kontaktojn kun aktivuloj ankaŭ de tiu agadkampo.

La 10-taga evento, kiun ni vere povas taksu sukcesa, realiĝis dank'al kunlaboro de sindonemaj deĵorantoj: Charlotte Blanc Maillard el Vevey, Nancy Fontannaz, Nicole Margot kaj Stefano Keller el Lausanne, Mireille Grosjean el Les Brenets. Dankon ankaŭ al aliaj esperantistoj, kiuj nin kuraĝigis veninte el Lucerno, Ĝenevo kaj Laŭzano.

Stefano Keller  
la kunordiganto de la projekto.  
Lausanne, la 27-an de septembro.



Ekinteresatinoj



Konklude al interesa diskuto kun Stefano Keller studentoj kunportas dokumentojn pri esperanto





Stefano Keller ĉirkaŭata de atentemaj aŭskultantoj

-oOo-

## Donacoj

Vi certe konscias, ke munto de budo en foiro kaŭzas altajn elspezojn. Se vi opinias, ke indas plue prezenti esperanton en foiro aŭ ekspozicio, tiam vi havas la eblon tion esprimi per kontribuo helpe de la poŝta ĉeko de SES akompananta kiel kutime la bultenon *SES informas*.

### **Pri la Svisa Enciklopedio Planlingva**

La Svisa Enciklopedio Planlingva *Universalaj Lingvoj en Svislando*  
verkita de Andreas Künzli

eliros la presejon komence de la monato oktobro.

Do la mendintoj de tiu verkego ĝin tre baldaŭ ricevos perpoŝte.

Ekde oktobro ĝi plue aĉeteblos je la normala prezo de svisaj frankoj 90.- aŭ € 60.-  
tra la servo de

CDELI, Bibliothèque de la Ville, CP 3034, CH-2303 La Chaux-de-Fonds

# **Orientsvisa Esperanto-Kulturrenkontiĝo**

## **14 kaj 15-ajn de oktobro**

### **Zürich**

**Organizita de Esperanto-Societo Zürich kaj Svisa Esperanto-Societo**  
(bonvolu aliĝi sub [kursoj@esperanto.ch](mailto:kursoj@esperanto.ch) aŭ telefone 044 251 50 25)

## **Sabaton, la 14-an de oktobro**

**Ekde 09h30 ĝis 21h30**

### **Gemeinschaftszentrum Hottingen**

Hottingersaal, Gemeindestrasse 54, Zürich

Por alveni el la ĉefa stacidomo de Zürich:  
trafu la tramon numero 3 direkto Klusplatz ĝis la haltejo Hottingenplatz

## **Programo**

10.00 – 10.15:	Alveno
10.15 – 11.15:	Filmo “Gerda malaperis” de Claude Piron
11.15 – 11.30:	Paŭzo kun vendado de kafo, kuko, trinkaĵoj
11.30 – 12.30 :	Prelego de Renato Corseti, prezidanto de UEA, pri la hodiaŭa situacio de esperanto en la mondo.
12.30 - 14.00 :	Tagmanĝo
14.00 – 14.30	Andreas Künzli prezentas sian Enciklopedion
14.30 – 15.00 :	kafumado, aĉetado de CD, libroj, k.t.p
15.00 – 17.30 :	Distra programo
18.00 - 19.30 :	Vespermanĝo
20.00 :	Adiaŭ

## **Dimanĉon, la 15-an de oktobro**

### **Familia migrado sur la monto Pfannenstil**


**Ekde la 9h00 ĝis la 16h00**

(bonvolu aliĝi sub [kursoj@esperanto.ch](mailto:kursoj@esperanto.ch) aŭ telefone 044 251 50 25)

**renkontiĝpunkto: Stacidomo Zürich Stadelhofen**

Por alveni el la ĉefa stacidomo de Zürich:  
ĉiudumminute veturas trajno al Stadelhofen

**La aliĝintoj ricevos la detalan informilon**



# Kongresen

**Brunsviko 2006**

**100 jarojn Germana Esperanto-Asocio**



Andreas Künzli preleganta

La 19-an de majo 1906 estis fondita en Braunschweig (Brunsviko) la Germanlingva Esperantista Societo (Deutschsprachige Esperantisten-Gesellschaft) kun membroj el Germanio, Aŭstrio kaj Svislando. Nur pro formalaj kialoj ĝi estis registrita

sub la nomo Germana Esperantista Societo. Tial la 83-a kongreso de Germana Esperanto-Asocio estis kunvokita al tiu urbeto en Norda Germanio, inter la 2-5-aj de junio 2006. La nombro de partoprenantoj atingis 200! Laŭ la anonco alvenis reprezent-

antoj el Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Ĉeĥio, Danio, Francio, Hispanio, Hungario, Irlando, Italio, Korea Respubliko, Litovio, Luksemburgio, Meksiko, Nederlando, Pollando, Rusio, Slovenio, Svislando, Usono. La tuta kongreso okazis en la urbocentra kvarstela Hotelo Mövenpick, kiu disponigis ne nur la ĉefan salonon, sed ankaŭ diversajn apudajn ejojn sur la sama etaĝo. Do oni havis la impreson troviĝi en eta UK kun la samaj malsimpatiaj, sterilaj kunvenejoj kiel kutime.

Laŭ la legendo la urbo Braunschweig, kiu hodiaŭ havas 246'000 enloĝantojn, estis fondita fare de grafo Bruno en la jaro 861. En la mezepoko Henriko la Leono (1129-96) elektis tiun ĉi urbon kiel sian regnocentron, konstruante la kastelon kaj la katedralon. En la regiono, kiu apartenas al la federacia lando Niedersachsen, troviĝas ankaŭ la mezepokaj urboj Göttingen, Hildesheim kaj Hanovro. Ĉiuj tiuj urboj, precipe la du laste menciitaj kaj Brunsviko mem, estis trafitaj dum la dua mondmilito de kruelaj bombatakoj, ĉar en tiuj urboj troviĝis militaj industrioj, tiel ke oni povas konsideri ilin grandparte detruitaj dum tiu tempo (1944-45). La rekonstruado de tiuj urboj daŭris du jardekojn. La arkitekturajn vundojn oni kompreneble tuj rimarkas, promene tra tiuj urboj, kiuj estas eble iom malbelaj, sed kiuj pro la multaj vendejoj kaj restoracioj kaj kelkaj rekonstruitaj konstruaĵoj el malnovaj tempoj parte reatingis sian ĉarmon. La bildon de tiuj vizitindaj urboj markas nuntempe ankaŭ la miloj da enmigrintoj turkaj, arabaj, polaj, rusaj k.a., kies lingvoj sonas nepreter-aŭdeble tra la stratoj. Kelkfoje oni kredas sin pli en Azio ol en Eŭropo. La akriĝantaj problemoj el tiu tikla

demografia konstelacio estas konataj al ĉiuj.

La kongreso mem estis malfermita de *Andreas Emmerich*, prezidanto de GEA, kaj la kongresa prelega sesio estis inaŭgurita sabate matene per la festparolado de d-ro *Ulrich Lins*, la aŭtoro de la fama libro *La danĝera lingvo*. Li ne nur menciis la svisdevenajn esperantistojn Jean kaj Jules Borel, kiuj komence de la 20-a jarcento elmigris al Berlino por produkti, kadre de la propra presejo kaj eldonejo Möller & Borel GmbH, la bezonatan lernmaterialon por la germanlingvaj Esperanto-studentoj. La komencoj de la Esperanto-movado de Germanio estas iel kompareblaj kun tiuj de Svisa Esperanto-Societo (kiu estis fondita en 1903). Sed la historio de la germana Esperanto-movado poste draste diferenciĝas de la svisa kazo, ĉar ĝi dependis de la historio de Germanio mem, kiu konsistis sinsekve el la Germana Imperio (1871-1918), Vejmara Respubliko (1919-33), Tria Regno (1933-45), Fremda Okupado (1945-49) kaj la periodo de la disdubiĝo inter FRG kaj GDR (1949-90). Se oni konscias, kion tiuj ŝanĝiĝantaj politikaj reĝimoj kaj la sortobatoj, ligitaj kun ili, signifis por la germana popolo, tiam oni ankaŭ pli bone povas kompreni la nefacilan situacion, en kiu la germana Esperanto-movado troviĝis en tiuj jardekoj.

D-ro *Detlev Blanke* el (Orient) Berlino, kiu ankaŭ prelegis kaj kiu estis unu el la ĉefaj funkciuloj de la GDRa Esperanto-movado, klopodas, kontraŭ nemaloftaj kontraŭstaroj, mistakoj kaj antaŭjuĝoj, defendi la pozitivan laboron, kiun plenumis la esperantistoj en Orienta Germanio. Stultaj burokrataj aplikoj, kiuj estis

karakterizaj por la komunismaj landoj, influis ofte ne nur la raciajn pensadon kaj agmanieron diversmaniere, sed blokis aŭ malebligis ankaŭ la normalan rilatadon kun la okcidentgermanaj esperantistoj. Malgraŭ tiuj obstakloj eblas konstati, ke la kontribuo de GDREA, kiu estis la oficiala Esperanto-asocio en Orienta Germanio, al la ĝenerala Esperanto-movado, estis konsiderinda. Se en GDR oni respektis la (iom rigidajn) regulojn, eblis tamen entrepreni nemalmultajn interesajn kaj seriozajn aktivecojn. Necesas do objektive kaj kun diferencoj kaj nuancoj, sed ne kun fiksaĵoj ofte falsaj, sen polemiko kaj malinformiteco rigardi la aferojn, kiujn okcidentanoj ofte ne povas kompreni. La atingojn, sukcesojn kaj problemojn de la GDRa Esperanto-movado

Blanke historiografiis kiel eble plej objektive en diversaj artikoloj, kiuj aperis en diversaj revuoj kaj libroj.

En tiu serio de prelegoj pri la historio de la germana Esperanto-movado d-ro *Werner Bormann* el Hamburgo vigle rakontis pri la spertoj faritaj de la GEA-kongreso en Brunsviko en 1972, kiu estis la kvindeka, kaj li klarigis ankaŭ, kial la kongreso en 2006 ne povis esti la centa.

Ĉiam tre ĉarme kaj optimisme sonas la elpaŝoj de prof. *Renato Corsetti* el Romo, nuntempa prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, kiu interese klarigis la diferencojn de la Esperanto-movado en la diversaj mondopartoj. Dum la esperantistoj en Eŭropo ŝajnas esti iom lacaj aŭ elĉerpitaj kaj senesperaj, la samideanoj en aliaj mondopartoj kiel Sudameriko, Afriko aŭ Azio ŝajnas esti plenaj de espero por pli bona estonto. Sur tiu fono la esperantistoj en Brazilo, Togo-

lando aŭ Ĉinio havas tute alian filozofian aliron al Esperanto kaj konas alian konkretan konduton kiel Esperanto-agantoj. Se okcidentano mem persone ne spertis tiun manieron vivi Esperanton, oni eble iom primokas tiun sintenon kiel naivan, kio estas iom maljusta. Ĉiukaze, se ni eŭropaj esperantistoj jam ne plu tiom kredas en la „finan venkon“ de Esperanto, despli la „triamondaj“ gekolegoj tion ankoraŭ plene kaj sincere faras, esperante povi plibonigi ne nur sian personan vivan staton, sed ankaŭ la tutan mondon mem, kiun ili evidente multe pli pozitive perceptas, malgraŭ malriĉeco, ol ni eŭropaj skeptikuloj kaj bonfartuloj.

En tiu kunteksto la kontribuo de *Wera Blanke* estis interesa, kiu parolis pri la t.n. alimondismo, kiu estas nova politika movado kies precipa celo estas konstrui „alian mondon“, sed ne laŭ la modelo de la tutmondaj kapitalistaj firmaoj kadre de la tutmondiga (aŭ globalizacia) procezo, kiu favoras la neoliberalismon. La historia merito de la alimondisma movado estas, ke ĝi entreprenis vastan laboron de malkaŝado kaj malmuntado de la novliberala ideologio, akompanate, precipe en la sociaj forumoj, de intensa produktado de alternativoj kaj de svarmo da iniciatoj. La Monda Socia Forumo estas forumo alimondista, en kiu la alimondistoj kunordigas kampanjojn kaj informas unu la alian pri la movadoj alimondistaj en la diversaj mondopartoj. Evidente la alimondismo allogas ankaŭ esperantistojn.

Por reveni al la situacio en Eŭropo indas diri kelkajn vortojn ankaŭ pri la aŭskultinda kontribuo de *Zlatko Tišljar*, konata Esperanto-aktivulo el Slovenio/Kroatio. Li proponis kiel

temon la kialojn de la disfalo de Jugoslavio en komparo kun ebla scenaro en la kazo de Eŭropa Unio. Krom esence soci-ekonomiaj motivoj de la jugoslavia disfalo la preleganto vidas ankaŭ lingvajn kriteriojn, kiuj akcelis la disfalon de tiu multnacia ŝtato. Analogajn krizajn simptomojn li kredas observi en Eŭropa Unio, kiu same kiel siatempe Jugoslavio malhavas komunan neŭtralan lingvon por pace unuigi la diversajn popolojn kaj eviti la ĝermadon de naciismaj tendencoj. Nome Tiŝljar persone timas, ke Eŭropon povus iam trafi la sama sorto kiel ĝi okazis kun Jugoslavio, precipe kiam la ekonomiaj problemoj (ekz. Akriĝo de la senlaboreco) en Eŭropo kreskos, kiuj siaflanke povus akceli la ekstremismon de novaj nacipolitikaj fanatikuloj, inkluzive de la apero de eventuala „nova Hitlero“, kiuj povus misuzi la krizan situacion por siaj propraj celoj. Konante la historion de Eŭropo, kie tiaj faroj havas tradicion, Tiŝljar ne ekskludas tian eblecon. Kiel neŭtrala universala lingvo Esperanto povus esti solvopropono por la eŭropaj (lingvaj) problemoj. Sed li bedaŭris samtempe, ke la politikistoj en Eŭropo ne interesiĝas pri tiu opcio. Tiel en principo povus ripetiĝi la sama historia konstelacio, kiel ĝi maturiĝis siatempe antaŭ la disfaloj de Sovetunio, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio.

Ankaŭ mi mem estis invitita de GEA, kaj delegita de SES, por prelegi pri la stato de la projekto Svisa Enciklopedio Planlingva (kiu tiam troviĝis en la pres-ejo). Tiuokaze mi rakontis ne nur la ideon kaj evoluon de tiu projekto, sed klarigis ankaŭ kelkajn specifaĵojn de la svisa movado planlingva kaj prezentis kelkajn tezojn lige kun la sorto de planlingvoj kaj aparte de Esperanto.

Persone mi kredas, ke dum la ideo de la neŭtrala universala lingvo restos apartenanta al la „eternaj ideoj“ de la homaro, povus esti, ke Esperanto ne plu estos konsiderata, malgraŭ tio ke ĝis nun ĝi estas la plej sukcesa internacia planlingvo. Sed ĉar neniu el ni scias, kio okazos ĉirilate post 20, 50, 100 jaroj, al ni restas nur spekulacioj.

Do kiel oni vidas, ankaŭ Esperanto estas plene envolvita en ĉiuj tiuj aluditaj temoj historiaj, politikaj kaj sociaj, kaj tio estas interesa afero. Bedaŭrinde la „ekstera publiko“ ne pli ofte utiligas Esperanton por diskuti pri tiuj temoj.

Krom prelego pri la eko-turismo en Ĉeĥa Respubliko fare de d-ro *Petro Chrdle* el Prago okazis kunvenoj de IKUE, KELI, EMAS, AGEI/ILEI, GEFA, GEC, REVELO, Landaj ligoj, FAME k.a. Dum la kongreso funkciis libroservo, kaj ekspozicio pri la historio de GEA estis montrita en apuda domo. En unu el la vesperoj okazis bankedo kaj koncerto de la grupo Asorti el Litovio. Dimanĉe estis organizitaj ekskursoj, kaj vespere la eksterlandaj reprezentantoj salutis la ĉeestantojn nome de siaj landaj organizaĵoj. Rande de la kongreso aperis pluraj eblecoj babilu aŭ diskuti krom kun la supre menciitaj elstaruloj ankaŭ kun plej diversaj aliaj samideanoj el diversaj landoj kiel Herbert Mayer (Aŭstrio), Halina Gorecka (Ruslando), ges-roj Grattapaglia (Brazilo) kaj ges-roj Moon (Luksemburgio), Aida Ĉizikaitė (Litovio), Christian Darbellay (Germanio) k.a. Tra la kongreslibreto oficiale salutis la kongreson Christian Wulff (CDU), ĉefministro de Niedersachsen, d-ro Gert Hoffmann (CDU), ĉefurbestro de Braunschweig, kaj prof. d-ro Hans-Peter Mayer (CDU), membro de Eŭropa

Parlamento. La postkongreso okazis en Herzberg/Harz.

Vidu: <http://www.esperanto.de>

kaj <http://www.esperantoland.org>

Andreas Künzli

## Kongresi kaj feriadi en Ĉeĥio

La 56-a KELI-Kongreso (Kristana Esperantista Ligo Internacia) okazis de la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto en Ĉeĥio, kiel en 2004. Sed ĉi-jare la elektita loko estis Strážné, en montara regiono ĉe la limo kun Pollando. Kvardeko da partoprenantoj el 10 landoj loĝis en la tri komfortaj domoj de la ripozejo « Horský Domov » [Montara hejmo] apartenanta al la Evangelia Eklezio de Bohema Kunfrataro. La proponita temo estis: « Naturo kaj progreso: kion toleri? » Intereseĝaj prelegoj kaj diskutoj okazis pri tiu grava demando. Sed la programo enhavis multajn aliajn eblvenojn: kantado, biblia meditado, libera tempo kaj ... la jar-kunveno de KELI. Verŝajne aperos detala raporto en la gazeteto *Dia Regno* kiel eble en aliaj esperantaj revuoj.

Por havi profiton de mia ĉeesto en Ĉeĥio mi estis organizinta duan semajnon en tiu interesa lando. Mi estis petinta mian amikon Mirek, ĉeĥa partoprenanto en la kongreso, ke li aranĝu por mi restadon en sia urbeto kaj ke poste ni ambaŭ loĝu kelkajn tagojn en la ĉefurbo Prago por viziti ĝin.

Tio perfekte okazis. Post hejmvoyaĝo kun Mirek per interurbaj busoj, mi restis de sabato al mardo en Nové Město nad Metují (Neustadt an der Mettau), amike gastigita de mia amiko kaj de ties edzino kaj filino en ilia malgranda loĝejo je la 4-a etaĝo de sep-etaĝa konstruaĵo. Piede aŭ uzante la malnovan veturilon de Mirek ni promenadis aŭ veturis vizitante la pentrindan urbon konstruitan sur roko

supre de la rivero. Ni foje traveturis la polan limon al la tutproksima banurbo Kudowa-Zdrój. Stranga etoso, kiu memorigis min pri la malnova filmo « *Lastan jaron en Marienbad* ».

Tria kaj lasta etapo de mia ĉeĥa restado: Prago. Denove plurajn horojn sidante en interurba buso por alveturi al la giganta ĉefurbo. Mirek, fakulo de malmultekostaj solvoj kaj kombinaĵoj, estis rezervinta preskaŭ senkoston ĉambron kun kuirebleco. Dum kvar tagoj ni, veturante kaj piedirante vizitadas. Mirek volas mem aĉeti enirbiletojn, mendi manĝaĵon en restoracio, peti informojn. Li opinias, ke la prezoj turistaj estas almenaŭ duobligitaj kaj li ne akceptas tion. Estas du kategorioj: kaj la ĉeĥoj kaj la miloj da eksterlandanaj turistoj. Mi estas ĉeĥo, diras li, kaj vi estas mia amiko. Marĉandemulo, Mirek almenaŭ sukcesos, ke ni lifte supreniris sur panoraman turon senpage, mi kiel handikapulo (mi uzas apogbastonon) kaj li kiel akompananto! Kvar tagoj plenplenaj.

Ĉu Prago estas bela? Mi pli volonte opinias, ke ĝi estas amasego de mirindaĵoj: konstruaĵoj ĉiustilaj kaj perspektivoj kapturnigaj. Rimarku, ke ĝi estas ankaŭ metropolo moderna, komerca, vivema, kie vi ne pagas en busoj, tramoj kaj subtertrajno, se vi estas pli ol sepdekjaraĝa. Ĉu la turistoj scias tion?

Esperanto ebligas belajn travivaĵojn.

André Sandoz

# Tutsvisa aktiveco

## CDELI

Centre de documentation et d'étude sur la  
langue internationale

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la  
Lingvo Internacia

Biblioteko de la Urbo, Progrès 33  
Case Postale 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds  
Tel. : 032 967 68 55.

Retadresoĵ :

[claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch)

[martine.schneller@ne.ch](mailto:martine.schneller@ne.ch)

[nancy.fontannaz@ne.ch](mailto:nancy.fontannaz@ne.ch)

[monika.molnar@ne.ch](mailto:monika.molnar@ne.ch)

### Venontaj stud-aranĝoj !

**Didaktika stud-sabato** okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Rezervu la sekvajn sabatojn : **oktobre 21, novembre 18, 2007 januare 20, februare 17, marte 17, junio 16.**

**Kultura sabata seminario** okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **novembre 4, decembre 2, 2007 februare 3, marte 3, majo 5, junio 2.** La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos rekompencitaj per ricevo de atestilo.

**Venontaj studtemoj** : La unua-libro de 1887, ties planlingva argumentado, prilingva enhavo kaj originalaj beletraĵ

tekstoj. Komparo inter la lingvo de 1887 kaj la hodiaŭa. Decidigaj influoj de la unua revuo *La Esperantisto*, de Louis de Beaufront, de Kabe, de Grabowski.

### Horaro de ambaŭ aranĝoj

10 h 00: Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

**10 h 45 : Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj. **11 h 00 : Studo.** 11 h 45 : paŭzo.

**12 h 00 : Studo.** 12 h 45 : Tagmanĝo.

**14 h 15 : Studo.** 15 h 00 : paŭzo. **15 h 15 :**

**Studo.** **16 h 00 : Konkludo.** 16 h 15 : Teumo, librovendo. **17 h 00 : Oficiala fermo.**

**Aliĝo** : Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la vendredo antaŭ la koncerna aranĝo je la 11h00 ĉu skribe al Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: [claude.gacond@ne.ch](mailto:claude.gacond@ne.ch),

ĉu telefone : CDELI: 032 967 68 55.

**Partoprenkotizo** : Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario. (Lerneĵano, studento, metilernanto kaj JES-ano senpage). Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon ĝis 11h00 la antaŭan vendredon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

-oOo-

## KCE

**Kultura Centro Esperantista**

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311


2301 La Chaux-de-Fonds

Tel. & Fakso : 032 926 74 07

[kce@esperantio.net](mailto:kce@esperantio.net)

Informojn pri la venontaj aranĝoj oni trovas en *Heroldo de Esperanto*.





# Loka vivo

## Ĉu svisa koruso ?

En Svislando troviĝas multaj divers-specaj tradiciaj popolaj kantoj. Vere indus esperantigi, kanti kaj almenaŭ iomete konigi ilin. Tial ni dezirus estigi malgrandan svisan koruson (fakte ni jam kreis etan voĉan grupon en Romandio kaj emus ĝin plibonigi kaj pliriĉigi). Endas, ke ĉiu kantanto konsentu ekzerciĝi kaj lerni hejme, sole aŭ are laŭ regiono (helpcele eblas registri la diversajn partojn). Tio ebligos interesan laboron kaj rapidajn progresojn dum la kelkaj ĉefkunvenoj, kiuj estos ĉiujare organizitaj laŭvice en diversaj lokoj, dum tutaj tagoj, sabate aŭ dimanĉe.

Ĉiuj, kiuj deziras partopreni, precipe tenoroj, kiuj plej ofte malmultas, skribu, telefonu aŭ retmesaĝu al :

Elisabeth kaj Dominique de Mestral,  
Le Prieuré 8, 1163 Etoy.

Tel. : 021.808.76.43.

demestral@etoy.ch

La venonta numero de nia bulteno

## *SES informas*

aperos komence de novembro.

Nepre sendu viajn artikolojn kaj la anoncojn kaj la raportojn pri la aktiveco de via societo ĝis la 15-a de oktobro.

## Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

Tel.: 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

## Kunvenoj

**Oktobre 28** : Hans-Peter Senn prelegos pri « Agave-regiono » en Portugalio.

**Novembre 23** : Invito ĉe Hans-Peter Senn. Programo 2007.

**Decembre** : Zamenhofa festo.

## Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20.

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

Monata kunveno la unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) 20h00 en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salono 2.

## Kunveno

**Oktobre 3** : Kun Anita Altherr.

**Novembre 1** : Publika konferenco franclingva de Claude Piron titolita « Comment de comprendre ? » en Uni Mail, salle R 070, Boulevard du Pont d'Arve 40.

**Novembre 7:** Kun Elisabeth kaj  
Dominique de Mestral.  
**Decembre 5:** Decidota.

# Lausanne

**Laŭzana Esperanto-Societo**

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 076 411 14 55

[esperanto@isuisse.com](mailto:esperanto@isuisse.com)

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan  
lundon de la monato je la 20h00.

## Kunvenoj

**Oktoĉbre 2:** Kunveno.

**Novembre 06:** Kunveno.

**Ĵaŭde 16an de novembro je la 18h00:** Invito de la Fotilara Muzeo en Vevey. Claude Piron konsentis traduki esperanten la tri paĝojn, kiuj gvidas la vizitantojn tra la pluretaĝa Muzeo. Jen la informaĵoj estas presitaj; la estraro de la institucio de Vevey deziras festi tiun momenton kun esperantistoj. Vi do ĉiuj estas invititaj.

Simple anoncu vian ĉeeston al Francisko Randin aŭ perrrete ([esperanto@citycable.ch](mailto:esperanto@citycable.ch)) aŭ telefone (076 411 14 55). Antaŭdankas la sekretario.

# Luzern

**Lucerna Esperanto-Societo**

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj: Hotelo Waldstätterhof: Zentralstr. 4 (proksime de la stacidomo). Tel. 041 227 12 71. Restoracio Emmenbaum: Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke. Ĉe Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

# Venontaj kunvenoj

**Oktoĉbre 4:** ĉe ges-roj Rey: 14h00 :  
Paroliga leciono kun Paul Scherer,  
14h30: Rakontoj pri travivaĵoj en kaj  
ĉirkaŭ la UK en Florence.

**Novembre 8:** Konversacia rondo kun  
Sonja Brun en Waldstätterhof 14h00-  
16h00.

**Decembre 6:** ĉe ges-roj Rey: 14h00 :  
Paroliga leciono kun Paul Scherer,  
14h30. Zamenhofologio kaj programo  
2007.

**2007 Januare 3:** Konversacia rondo  
kun Paul Scherer en Waldstätterhof  
14h00-16h00.

## Kantono de

# Neuchâtel

Ekspozicio:

**Ŝpuroj de ie kaj tie  
Traces d'ici et de là.**

En la kantono Neuchâtel okazadas nuntempe granda agado por altiri neŭŝatelanojn kun la multnombraj eksterlandanoj, kiuj loĝas en la kantono. La nomo estas « **Neuchatoï** » = Neuch al vi.

Ene de tiu agado okazadas ekspozicio kun la nomo « **Traces d'ici et de là** » (Ŝpuroj de ie kaj tie). En tiu ekspozicio multaj lingvoj parolataj en la kantono estas prezentataj, pli ol 80 entute. La ekspozicio estis prezentita en Val-de-Travers, en Val-de-Ruz, en La Chaux-de-Fonds kaj en Neuchâtel.

Por la komenco en Neuchâtel estis granda festo kun ĉeesto de membro de la registaro kantona kaj delegito por la eksterlandanoj de la kantono. Dum tiu festo pluraj personoj povis paroli sian lingvon, por ke la spektantoj aŭ

aŭskultantoj malkovru ĝin. Ne la 80 lingvoj aŭdiĝis, sed sinjorino Reichen elektis inter aliaj esperanton. Antaŭ multnombra publiko Mireille Grosjean povis ne nur iom paroli en esperanto, sed ankaŭ mallonge prezenti la lingvon kun ties tradukita literaturo. « *Viaj literaturoj ekzistas en esperanto!* » ŝi diris al la reprezentantoj de la aliaj lingvoj. « *Esperanto estas ponto al ĉiuj kulturoj kaj protektas la kulturecan diversecon.* »

En la ekspozicio « *Ŝpuroj* » por montri unu lingvon la organizantoj preparis kadron, kiu entenas tekston en la celata lingvo, foton de la parolanto kaj objekton rilate al la lingvo kaj kulturo. La tuto aspektas kiel bildo tre vivoplena. Por prezenti esperanton inter kvindek da lingvoj Mireille Grosjean elektis tekston de Zamenhof « *...sed homo kun homo...* » ; la objekto estas memkompreneble kvinpinta stelo verda. Feliĉe la kadro same estas verda, tion elektis la organizantoj. Sur la foto videblas tri generacioj de esperanto-parolantoj : Mireille Grosjean la avino, Marion Bélisle la patrino, Romain kaj Samuel la filoj.

### « Donitaj paroloj » Libro-interŝanĝo iniciatita de tri eklezioj

De la 13-a ĝis la 15-a de januaro la tri eklezioj reformita, katolika-romana kaj katolika-kristana de la neŭŝatela kantono organizis libro-interŝanĝon laŭ la fenomeno *Bookcrossing* : La paroĥanoj estis invititaj, forlasi en publikaj lokoj (kafejo, stacidomo, ktp) librojn, kiuj plaĉis al ili. Poste eble iu prenos ĝin, legos kaj relasos aliloke. Kompreneble la enhavo devis rilati kun pli-malpli kristana temo.

Unu semajnon antaŭe la legintoj alportas la librojn al respondecul(in)o en ĉiu komunumo. Post rapida ekzameno de la enhavo oni gluis glumarkon klarigante la agadon. La titolo kaj la aŭtoro estis notitaj, por eble trovi la devenon de la libro. Je la menciitaj datoj ĉiu iris al elektita loko, por lasi la libron. En Le Locle estis en kafejo. Trinkinte kafon, ni foriris, lasinte la libron surtable.

Speciala retpaĝo estas de la 10-a de januaro malfermita :

([www.parolesdonnees.ch](http://www.parolesdonnees.ch))

Tiel ĉiu povas lasi komenton aŭ reagon pri la agado aŭ pri libro(j), kiu(j)n iu trovis. Laŭ statistikoj inter 700 kaj 1000 libroj estis dislasitaj en la kantono.

Per tiu ideo la eklezioj volas montri, ke ili aktivis en la societo, ili estas proksimaj de la loĝantaro. Anstataŭ grandegaj afiŝoj por pagi impostojn, ĉijare la tri komunumoj elektis modernan kaj senpagan disdonon. Kompreneble, kiel en ĉiu grupo, kelkaj reagis negative, sed la plej junaj akceptis afable tiun amuzan ludon.

La libro-interŝanĝo estas internacia kaj pli kaj pli konata :



ĉiu povas ludi !  
Ekzemple vi legis libron, kiu vere plaĉis al vi. Vi decidis lasi ĝin en stacidomo,

vagono, sur benko aŭ en restoracio. Nenio pli ! Vi povas ankaŭ registri vin en la retpaĝo :

[www.bookcrossing.com](http://www.bookcrossing.com).

Tiel vi eble vidus, kie via libro estis trovita. Meze nur 20% de la registritaj libroj ricevas reagon. Certe kelkaj mortas en rubujo ; sed tio estas ankaŭ la ludo. Mi rigardis la retpaĝon 'bookcrossing' kaj mi rimarkis, ke en la mondo « vojaĝas » libroj pri kaj en

esperanto. Estas do nova metodo, por alvenigi novajn personojn al la lingvo.

Mi do rekomendas al vi : se vi trovas libron, ne forĵetu ĝin, sed legu kaj lasu ĝin en publika loko por alia nova vojaĝo !

Jean-Marc Leresche

### **Legado de legendoj en Centre culturel neuchâtelois Théâtre du Pommier en Neuchâtel**

La plurkultura biblioteko de Neuchâtel posedas librojn en multaj lingvoj kaj ankaŭ en esperanto. Paralele ĝi organizas laŭtleĝadon de tekstoj. Tiu evento okazadas dimanĉe posttagmeze. Ĉiun jaron la deĵorantoj de la biblioteko elektas kelkajn lingvojn. Pasintjare la organizantoj ekrilatis kun Mireille Grosjean por havi laŭtleĝadon de legendo en esperanto kun traduko.

Tiu evento okazis la sesan de novembro 2005. Marion Bélisle rakontis en esperanto kaj Mireille Grosjean tradukis al la franca. Marion elektis konatan rakonton, por ke la publiko povu iom diveni la signifon antaŭ ol aŭdi la tradukon. Enkonduke Mireille Grosjean klarigis, ke oni havas pere de esperanto aliron al la legendoj kaj literaturo de multaj malsamaj lingvo tra la mondo kaj ke la publiko aŭdos konatan legendon « *La lupo kaj la sep kapridoj* ». Post la legado kelkaj geaŭskultantoj venis dirante « *Mi povis iom kompreni !!* ». Plie la deĵorantoj de la biblioteko diris kelkajn tagojn poste, ke homoj interesiĝis pri la libroj en esperanto.

Estis bela okazo meti nian lingvon en kunesto de aliaj lingvoj por vasta publiko, konkludas Mireille Grosjean.

# Wil

## **Esperanto-Klubo Wil**

[www.esperanto.ch/wil](http://www.esperanto.ch/wil)

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel.: 071 393 41 49. [chaves-walder@bluewin.ch](mailto:chaves-walder@bluewin.ch) kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel.: (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax: 071.390.04.47

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (apud la suda elirejo de la fervoja stacidomo).

## **Kunvenoj**

**Novembre 8** : Raporto pri la UK en Florenco kun Roberto kaj lingva ekzercado kun Wolfram.

**Decembre 6** : Fonduo kun la familio Fischer kaj poemoj, rakontoj kaj kantoj.

# Zürich

## **Esperanto-Societo Zürich**

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld.

Tel.: 044 251 50 25

[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch). reto:

[www.esperanto.ch/zuriko](http://www.esperanto.ch/zuriko)

**Regula merkreda programo** : krom dum la ferioj : 18.00–18.45 : kurso por komencantoj. 19.00–19.45 : konversacia rondo. (bonvolu telefone aliĝi dum la oficeja horaro ĝis la tago antaŭa : 044 251 50 25 aŭ retroŝte : [info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)).

## **Kunvenoj**

**Oktobre 14** : **Orientsvisa Esperanto-Kulturrenkontiĝo**. Vidu paĝon 15-a.

**15** : **Familia migrado** sur Pfannestil : Vidu paĝon 15-a.

**Decembre 8** : Zamenhofa festo kun fonduo.

# De hilelismo al homaranismo

## ĉe L. L. Zamenhof

Resume pri ĉefaj klarigoj dum la seminario pri hilelismo / homaranismo de la 3-a de decembro 2005 en CDELI, La Chaux-de-Fonds (parto dua)

De Andreas Künzli

Fakte L.L. Zamenhof origine intencis prezenti la hilelismon ne antaŭ la 2a Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo en 1906. En *Ruslanda Esperantisto* 1/1906 li skribis: „*La mirinda sukceso de la Bulonja kongreso konvinkis la iniciatorojn de la hilelismo, ke absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla. Tial ili decidis uzi la plej proksiman tutmondan kongreson de la esperantistoj en Ĝenevo en Septembro 1906, por proponi al ĉiuj amikoj de interpopola justeco, unuiĝi en apartan grupon, kiu inter la amikoj de internacia lingvo prezentus apartan sekcion.*“

### Hilelismo – homaranismo en 1906

Rigarde al la komplika politika kaj socia situacio en la Ruslanda Imperio, de kie Zamenhof devenis, li decidis elpaŝi kun la projekto multe pli frue ol origine intencite. Li pravigis tiun intencon tiel: „*En la nuna kriza momento, kiam nia patrujo bezonas ĉiujn siajn fortojn, estas necese enkonduki en la vivon tiajn dogmojn, kiuj permesus al ĉiuj diversgentaj kaj diversreligiaj regnantoj ĉesigi siajn reciprokajn malpacon kaj kalkulojn kaj sincere unuiĝi por la savo de nia komuna patrujo, kiu devas kompreneble fariĝi fine propraĵo de ĉiuj siaj regnantoj kaj ne sole de unu gento aŭ religio.*“

Samtempe li forte dubis, ĉu la homoj en Ruslando estas maturaj por akcepti tian ideon: „*Kvankam la grandega plimulto de niaj samregnantoj estas ankoraŭ tute ne preparita por nia ideo kaj nia voĉo longan tempon ankoraŭ restos voĉo krianta en dezerto, estas tamen grave, ke niaj principoj estu konataj al niaj samregnantoj, por ke tiuj malmultaj, kiuj serĉas intergentan justecon, sciu, en kio ĝi laŭ nia opinio konsistas. Jen estas la kaŭzo, kial la hilelistoj decidis publikigi siajn dogmojn jam nun kaj proponi al ĉiuj amikoj de intergenta egaleco kaj frateco, kiel ajn malgrandnombraj ili estas, aliĝi al ili.*“<sup>i</sup>

Ĉar Zamenhof anticipe kalkulis pri rezisto kontraŭ sia hilelismo el esperantistaj medioj, en piednoto al sia kontribuaĵo en *Ruslanda Esperantisto* 1/1906 li rimarkigis: „*Oni ne devas intermiksi la hilelismon kun la esperantismo ! Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj. Oni povas esti bonega esperantisto kaj tamen kontraŭulo de la hilelismo.*“

### Aproboj kaj unua rondo hilelista-homarana

En la marta numero de *Ruslanda Esperantisto* redaktoro A. Asnes raportis, ke la ideo de la hilelismo trovis grandan intereson ĉe la esperantistoj kaj ke multaj

Esperanto-adeptoj proklamis sian aliĝon al la teorio.<sup>ii</sup> Inter la malmultaj publikaj admirantoj de la idealismo de L.L. Zamenhof troviĝis, krom Asnes, la redaktoro mem de *Ruslanda Esperantisto*, ankaŭ la fama verkisto Lev Nikoaleviĉ Tolstoj (1828-1910) kaj la renoma lingvisto Jan Baudouin de Courtenay (1845-1929). Ambaŭ personecoj detale kaj tre pozitive esprimis sin pri la esperanta afero, inkluzive de ĝia humanisma ideo en si mem.<sup>iii</sup>

Kiel adreson de la sekretario de la „Unua rondeto hilelista“ Zamenhof indikis la adreson de sia frato d-ro Aleksander Zamenhof en Varsovio, str. Nowolipki No 43 (tiu adreso estis provizora, ĉar Zamenhof anoncis, ke baldaŭ estos alia sekretario). En la kvara numero de 1906 de *Ruslanda Esperantisto* oni povis legi raporton pri la agadoj de la „Unua Grupo Homarana“, kies nova sekretario estis d-ro A. Waldenberg en Varsovio.

Iom poste en 1906 Zamenhof aperigis „plibonigitan kaj plikompletigitan eldonon de dogmoj de hilelismo“ en formo de aparta broŝuro (en la rusa lingvo kaj en esperanto en eldono de po 700 ekzempleroj) kaj sub la titolo „homaranismo“. Sed la eldiroj de la dogmoj esence restis la samaj, la teksto estis pli malpli identa, ĝi fariĝis iom pli longa pro la aldono de diversaj pli detalaj klarigoj; simple la nocio hilelistoj malaperis kaj estis anstataŭita de la nocio homarano. Zamenhof klarigis, ke „*la ideo de homaranismo naskiĝis de la antaŭe ekzistinta ideo de 'hilelismo', de kiu ĝi distingiĝas nur per tio, ke la hilelismo koncernis nur unu homan grupon, dum la homaranismo koncernas ĉiujn popolojn kaj religiojn*“. La homaranismon mem li difinis kiel „*celadon al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco*“.

## La kritiko de Dombrovskij

Sed aliflanke la hilelismo kaŭzis akran kritikon flanke de kelkaj signifaj eŭropaj esperantistoj. Inter la unuaj reagantoj al la dogmoj de hilelismo troviĝis A.A. Dambrauskas (Dombrovskij, 1860-1938), katolika pastro en Kaŭno (Litovio, Ruslanda Imperio).

Jen kelkaj ĉefaj citoj el la komento de Dombrovskij, kiu estis publikigita en *Ruslanda Esperantisto* 3/1906:

„La hilelismo, al kiu *Ruslanda Esperantisto* oferis tiom da loko en sia januara numero, meritas ĝin, sed ne en tia grado, kiel eble pri ĝi pensas ĝiaj iniciatoroj.

En la hilelismo oni devas diferencii du flankojn: *pozitivan* kaj *negativan*. Pozitiva valoro de hilelismo konsistas en tio, ke ĝi igas ĉiun homon pensantan difini pli precize siajn rilatojn: *al si mem, al Dio, kaj al siaj proksimuloj*. (...) La hilelismo volas montri, ke (...) iom da filozofio en la vivo estas absoluta necesajo. Kaj en tio ĉi la hilelismo estas prava. Ni diros plu: ĝi povas esti ankoraŭ utila al homoj havintaj antaŭe nenian principojn religiajn aŭ filozofiajn. En tio ĉi konsistas la pozitiva flanko de hilelismo.

Sed (...) en hilelismo ekzistas ankoraŭ alia flanko – negativa. Per ĝi la hilelismo volante esti sistemo supernacia kaj superreligia, fariĝas bedaŭrinde kontraŭnacia kaj kontraŭreligia. (...) Malgraŭ belaj vortoj kaj bonaj intencoj de iniciatoroj, la diritaj ‘dogmoj’ devos ĉiun konsekvencon hileliston pere aŭ senpere igadi al la malŝato de sia patra lingvo, de sia nacio, de sia lando kaj de sia religio, ĉar la hilelismo havas ja

nur *unu celon* – el ĉiuj homoj kaj nacioj fari unu grandan ‘neŭtrale homan’ formik-ejon, en kiu ekzistus neniam diferenco – nacia, politika, religia, filozofia ktp.

Laŭ nia opinio la fina celo de hilelismo, nome la unueco kaj unuiĝo de ĉiuj nacioj estas idealo bela, sed *tre malnova*. La unua homo, kiu ĝin klare esprimis estis efektive ‘*palestina saĝulo*’, tamen ne Hilel’o, sed Jesuo Kristo. [Dombrovskij referencis al la Johana Evangelio, XVII,21, kie li trovis la principon de la universala unueco].

La iniciatoroj de hilelismo opinias, ke la kaŭzoj precipaj de nuntempa societa malbono en la tuta mondo estas la diverseco de lingvoj kaj religioj. Granda eraro. La multlingveco kaj diversreligienco estas ne *kaŭzoj*, sed nur *pretekstoj* de militoj kaj persekutadoj. La homoj kaj nacioj persekutas kaj militas ne por tio, ke ili estus *troaj patriotoj aŭ troaj religiuloj*, sed kontraŭe, ke ili estas *nesufiĉe patriotaj* kaj malmulte *religiaj*, aŭ pli simple pro tio, ke ili estas *tro malbonaj*. Ili scias bonon, sed ĝin ne faras, ili scias malbonon kaj ĝin faras. Por fari do homojn pli bonaj, por inspiri al ili pli da *bona volo kaj pli da morala forto* la hilelismo, laŭ mia opinio, ne taŭgas.

Cetere, pri la abomenindeco de persekutoj kaj militoj kaj pri la neceso de unueco multe kaj bele predikadis kaj predikadas la anoj de humanismo, de kosmopolitismo, de framasonismo k.a.

Tiel ni tute ne komprenas, kia estis bezono malkvietigi la bonan babilonan rabenon Hilel’on por bapti per lia nomo la novan sistemon, des pli, ke la dirita ‘palestina saĝulo’ (...) apenaŭ konsentus la ‘dogmojn’ de hilelismo rekoni kiel siajn.“

Al Asnes Zamenhof skribis la 25an de januaro 1906: „*La kritiko de prof. Dombrovski sendube estas tre mallaŭda (ĉar li ja estas pastro kaj sekve ne povas aprobi hilelismen)*“.

En la sama letero Zamenhof montris sin tute malferma al kritiko: „*Tamen mi konsilas al vi akcepti lian kritikon por via ĵurnalo; kaj ne sole lian, sed ankaŭ diversajn aliajn kritikojn, kiujn vi eble ricevos, ĉar estas necese, ke la afero estu senpartie kaj ĉiuflanke analizita kaj prijuĝita. En okazo de bezono mi poste (sub la pseŭdonimo) skribos kontraŭkritikon.*“ Ankaŭ en posta letero al Asnes Zamenhof konfirmis, ke li estus „*eĉ tre kontenta, se via gazeto malfermus vastan polemikon pri la hilelismo-homaranismo, ĉar nur per senpartia polemiko ni ekscios la efektivan veron, kio estas por mi la plej grava*“.<sup>iv</sup>

## Repliko al Dombrovskij

Sian anoncitan replikon al la kurta, sed akra kritiko de Dombrovskij ‘Homarano’ do aperigis en *Ruslanda Esperantisto* 5/1906. En tiu artikolo la aŭtoro enkonduke rimarkigis, ke la kritiko de Dombrovskij mirigis lin kaj ke li atentigas, ke „*la tuta artikolo estis kaŭzita de simpla malkompreniĝo*“.

Konsciante, ke la temo estas „*tiel ampleksa*“, Homarano provis forviŝi kelkajn malklarecojn, kaŭzitajn de preseraro en la rusa teksto. Krome Homarano avertis, ke li ne intencis meti „*Hilelon pli alte ol Jesuon Kriston*“: „*La homaranoj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon komparadi reciproke la valoron de diversaj religioj kaj de iliaj fondintoj; la ideo detronigi Jesuon Kriston por la kristanoj aŭ Mozeon por la hebreoj aŭ Mahometon por la mahometanoj ktp. kaj surtroni anstataŭ ili Hilelon neniam eĉ por unu minuto venis en la kapon de iu homarano.*“ La hilelismo ne estis

kreita por „*honoru pli Hillelon ol Kriston aŭ Mozeon, sed nur tial, ke la principo, kiu donis al la homaranoj la eblon krei ponton inter ĉiuj religioj (...)*“. Krom tio la hilelistoj „*ne havas eĉ la plej malgrandan intencon krei ian novan religion. (...)*“ En letero al Javal, 17.05.1906, Zamenhof konfirmis, ke la „*homaranismo ne estas nova religio, ĝi estas nur neŭtrala ponto (...)*“.

La riproĉon de Dombrovskij, ke la ideoj de la hilelismo estas nenio nova, Homarano replikis, ke „*en la daŭro de tre multaj jaroj la iniciatoroj devis malfacile bataladi kun si mem, konstante serĉadi, esploradi kaj ŝanĝadi*“ por inventi tiujn dogmojn, kiuj estis kreitaj por difini la „*absolutan justecon kaj logikon*“. La diferencoj de la antaŭaj religiuloj kaj la hilelistoj estus, laŭ Homarano, „*ke ili parolas kaj revas pri la frateco de la homaro kaj ni celas ĝin praktike efektiviĝi*“. Ĉi tiu sendube hereza konkludo de judo certe ne povis esti akceptebla por kristana pastro. Longe Homarano ankaŭ provis klarigi al Dombrovskij la problemon de falsa patrioteco kaj la principon de sengenteco, ekzemple ĉe landnomoj, kiun li kiel ‘homo de la sistemo’ evidente ne povis percepti.

Fine, por kontraŭ-argumenti la riproĉon de la kontraŭ-religieco de la hilelismo, Homarano admonis, ke la homaranismo „*estas destinata sole nur por homoj libere pensantaj*“ kaj ke „*la homaranismo ilin rekondukis al Li*“. Necesas kompreni la simplan veron, ke Zamenhof kiel judo ne povis esti kredanto de kristanismo, nek adepto de iu eklezio. En lia repliko eĉ aperis akraj riproĉoj kontraŭ la eklezio, nome ke la eklezio forigis la homojn de la vera Dio. La „*diversajn elpensitajn ‘sanktajn verojn’*“ de la eklezio Zamenhof-Homarano simple rifuzis – ili havus nenion komunan kun la vera religio. Pro tio la homoj preferus la „*nekonatan misteran Forton de la mondo*“, „*sed ili ne povas tion ĉi fari, ĉar la nomon de Dio abomenigis al ili la falsa eklezia ideo pri Li*“. Por tiuj Di-kredantoj iri en preĝejon estus „*hipokritaĵo*“. Konklude: „*La homaranismo redonas al ili almenaŭ parte tion, kion ili perdis*“. Zamenhof – ĉu malamiko de la kristanismo kaj de la kristana eklezio?

Por ekskludi ĉian miskomprenon, Homarano emfazis, ke „*la homaranismo tute ne volas anstataŭigi la ekzistantajn religiojn (...) per aliaj*“, ĝi volus esti nur „*paralela*“ al ili. Per la homaranismo „*ni volas ne pereigi la religion, sed savi ĝin de la senduba perejo, al kiu alkondukis ĝin la batalado inter la prudento kaj eklezio*“.

Ĉi tiu konflikto eble montras pli klare, kial multaj esperantistoj ne volis okupiĝi konkrete pri la homaranismaj ideoj de Zamenhof, kiun ili konsideris kiel privataĵon de la kreinto de Esperanto. Tial la homaranismo estis forgesita kaj poste ne plu ludis rolon en la konscio de la esperantistoj. Ne nur la lingvistikaj, ortografiaj kaj gramatikaj demandoj en la lingvo Esperanto, sed ankaŭ la konkretaj ideologiaj (hilelismaj) konsideroj de Zamenhof distancigis kelkajn esperantistojn, ĉefe en Francio, sed ankaŭ en Svislando (kiel mi montros en Svisa Enciklopedio Planlingva), de Zamenhof kaj de ties lingvo Esperanto kaj kondukis ilin en la havenon de la Ido-movado. Nu la Ido-movado certe havas sian kernon jam antaŭe, sed la tempo de la eksplodo de la Ido-skismo ĝuste *post* la apero de la homaranismo eble ne estis hazardo.<sup>v</sup> En tiu kunteksto necesus relegi ĉiujn gravajn dokumentojn lige kun la genezo de Ido. Kaj necesus ankaŭ studi la talmudon aŭ ricevi klarigojn de judreligia fakulo por pli bone kompreni la judecon de L.L. Zamenhof.



## Ankaŭ francoj rifuzis la homaranismon

Pri la sinteno en Francio, Zamenhof skribis al Emile Javal (09.04.1906) jenajn liniojn: „*Pri la ideo de homaranismo mi scias tre bone, ke nun ĝi en Francujo havos nenian sukceson kaj en la unua tempo ĝi trovos tie nur atakon kaj ridon*“, kaj aldonis: „*sed konante la grandan kaj noblan francan popolon, kiu la unua proklamis la rajtojn de 'homo', kiu plene ensorbis en sin la ideojn de la granda revolucio, - mi estas tute plene konvinkita, ke pli aŭ malpli frue (eble eĉ tre baldaŭ) la francoj pli ol ĉiuj aliaj forte entuziasmiĝos por la homaranismo kaj fariĝos la apostoloj de tiu ĉi ideo por la tuta mondo*“<sup>vi</sup>. Kvankam Zamenhof konfirmis, ke temas pri lia „*profunda kredo*“, en tiu ĉi punkto li evidente eraris, estis tro naiva aŭ volis esti diplomata. La jaro en kiu li aperis kun sia homaranismo estis en Francio ne for de la antisemitaj ekscesoj (Dreyfus-skandalo) kaj de la formala separo inter eklezio kaj ŝtato en la jaro 1905. Cetere ŝajnas, ke Javal pretis helpi al Zamenhof disvastigi lian homaranismon, ĉar laŭ letero de Zamenhof al tiu franco (23.04.1906) Javal promesis sciigi la homaranismon al la ĉefaj francaj gazetoj. Evidente Javal ne aprobis kelkajn punktojn en la homaranismo, sed ĉar li volis kuraĝigi kaj apogi Zamenhofon, li montris helpemon kaj ilia korespondado estis civilizita, milda kaj fruktodona.

En sia letero de la 8a de junio 1906 al Javal Zamenhof konfesis tri principajn erarojn en la homaranismo: 1. tro grava kaj tuja rolo al neŭtrala lingvo; 2. la nekutimaj nomoj por landoj; 3. religia dogmo. Tial li skribis, ke li decidis ŝanĝi tiujn detalojn, sed delegis la diskuton al la Unua Grupo Homarana (ĉar supozeble Zamenhof mem ne deziris ŝanĝi tiujn punktojn).<sup>vii</sup>

## Kritiko de de Beaufront

Alia franco, kiu ne ŝatis la homaranismon, estis Louis de Beaufront (1855-1935), doktoro pri teologio, franca katoliko (kaj posta protagonisto de Ido). Li riproĉis al Zamenhof i.a., ke la homaranoj estus konstruintaj sian tutan aferon sur la sukceso de la bulonja kongreso. La homaranoj replikis, ke la „*homaranismo estis preparata en la daŭro de tre multaj jaroj*“. Due de Beaufront imputis al Zamenhof kaj ties homaranoj, ke ili estus tro naivaj, ĉar ili kredus, ke la homaranismo donus al la homaro plenan pacon kaj feliĉon. Reage al tiu riproĉo Zamenhof atentigis, ke oni diris la samon antaŭ dudeko da jaroj kiam Esperanto estis publikigita. Trie de Beaufront ne povis vidi parencecon inter esperantismo kaj homaranismo. Zamenhof klarigis al li, ke „*Lingvo internacia havas la celon krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj*.“ La homaranismo estus do „*nur plifortigita esperantismo*“, krom tio la deklaro estus „*nur provizora, por prezenti la esencon de nia afero, kaj la teksto definitiva estos fiksita nur iam poste, post matura komuna interkonsiliĝo*“. En la sama letero Zamenhof konfesis, ke „*la homaranismo estas ja nia idealo privata, kiun ni al aliaj esperantistoj tute ne intencas altrudi*“. Necesas kompreni, ke Zamenhof neniam vidis en Esperanto nur rimedon nur por „*interŝanĝi ilustritajn poŝtajn kartojn aŭ por fari bonajn negocojn – aŭ eĉ por sukcese militi inter si*“, sed li vidis en ĝi ĉiam ankaŭ la grandan internan ideon, por kiu indus labori kaj lukti.

Se mi skribis ĉi tie, ke *Zamenhof* replikis, tiam efektive la koncernan nefermitan respondleteron al de Beaufront subskribis d-ro Aleksandro Naumann, sekretario de la Unua Grupo Homarana. Ĝi estis publikita en *Ruslanda Esperantisto*, n-ro 6-7/1906.

## Kiu ankoraŭ kontraŭis la homaranismon?

Inter aliaj francaj kritikantoj de la hilelismo-homaranismo troviĝis la esperantistoj Gaston Moch, Carlo Bourlet, Théophile Cart kaj Hippolyte Sebert. La argumentoj esprimiĝis parte el la racia-ateista perspektivo.

En sia letero de la 26a de majo 1906, al Javal, Zamenhof skribis: „*La plej akraj malamikoj de la homaranismo estas la esperantistoj Varsoviaj*“ kaj iom klarigis la kaŭzon. Ŝajnas, ke la poloj tute ne aprobis, ke Polujo estu nomata „Varsovia Lando“<sup>viii</sup>.

La orienteŭropaj judoj, kiuj inter si kverelis pri la plej taŭga koncepto por la estonteco de la judaro (cionistoj, bundistoj, aŭtonomiistoj), estis mem okupataj pri la demando de la reaktivigo de la *juda (jida) lingvo* kaj evidente havis nulan komprenon por la ideoj de sia samgentano L.L. Zamenhof.<sup>ix</sup>

Alia konata kritikanto de la homaranismo de Zamenhof fariĝis poste ankaŭ E.K. Drezen (1892-1937), kiu aliĝis al la Esperanto-movado en 1911. Tial persone li ne spertis la homaranisman diskuton. Li argumentis el la vidpunkto de komunisto-materiisto, kiu ne povis malkovri klasbatalan karakteron en la zamenhofa homaranismo, kies religiecan karakteron Drezen kompreneble ne povis akcepti.

**Daŭrigote :** En la venonta tria kaj lasta parto mi montros, kiel oni malrekomendis al Zamenhof prezenti aŭ nur menci la homaranismon en la 2a Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, kiel li hezitis veturi al tiu kongreso, sed finfine tamen aperis. Ni aperigos ankaŭ la ĝenevan kongresparoladon de Zamenhof de la jaro 1906, do antaŭ ekzakte 100 jaroj.

<sup>1</sup> DREZEN, E: Zamenhof. Moskvo 1929, p. 11-14, 16s.; vd. ankaŭ: DREZEN, A., Analiza historio de Esperanto-movado. Moskvo 1930, p. 34s..<sup>x</sup>

### Piednotoj:

<sup>i</sup> ludovikito, klopodis organizi sed vane, p. 254-5.

<sup>ii</sup> vd. SES informas 1/2006, p. 16.

<sup>iii</sup> detale pri tio mi skribis en mia universitata diplomverko de 1992 (nepublikigita), kie oni ankaŭ trovas la originajn fontindikojn.

<sup>iv</sup> klopodis organizi sed vane pp. 266, 273.

<sup>v</sup> Wilhelm Wunsch (en B. Kotzin, *Historio kaj teorio de Ido*) esprimis la supozon, ke ĉe la protagonistoj de Ido rolis verŝajne ankaŭ antisemitaj sentoj.

<sup>vi</sup> klopodis organizi sed vane p. 298.

<sup>vii</sup> klopodis organizi sed vane p. 340.

<sup>viii</sup> klopodis organizi sed vane p. 329.

<sup>ix</sup> WEINSTEIN, Miriam (2003): Jiddisch. Eine Sprache reist um die Welt, S. 98f.

<sup>x</sup> DREZEN, E: Zamenhof. Moskvo 1929, p. 11-14, 16s.; vd. ankaŭ: DREZEN, A., Analiza historio de Esperanto-movado. Moskvo 1930, p. 34s.

# Mortoj

## Heidi Baur-Sallenbach - 1916-2006

Heidi Sallenbach naskiĝis en Winterthur la 24-an de aŭgusto 1916. Ŝi studis la germanan, francan kaj anglan lingvojn kaj ties literaturojn en la Zurika Universitato, kie ŝi doktoriĝis per disertacio pri *George Sand und der deutsche Emanzipationsroman* aperinta en 1942. Tiu verko konsultebblas en CDELI sub la numero ESP 7889. Profesie ŝi laboris kiel sendependa ĵurnalistino kaj teatra kritikistino.

Heidi Sallenbach lernis esperanton en 1936 kaj baldaŭ tre aktive kunlaboris kun Arthur Baur, kiun ŝi edzigis en 1943. Kun li ŝi unue pretigis la epokfaran verkon *Svisa Antologio* aperintan en 1939, kontribuante per siaj beletraj konoj kaj sia traduka talento.

Kaj poste dum 40 jaroj ŝi kunlabore aktivis kadre de Svisa Radio Internacia, kie ŝi ofte oratoris legante la esperantajn prelegojn, kiujn Arthur estis redaktinta, sed pro troa profesia okupiteco ne povis veturi al Berno por ilin mem prononci. Plurfoje kun mia edzino ni havis tiel la okazon ŝin renkonti, kiam ni alvenis por niavice registri niajn radio-elsendojn, kaj ankaŭ okaze de rendevuaj kunidoj kun la radio-direktoro. Tiam ni sentis la

spiritan unuecon propran al la paro Heidi kaj Arthur Baur, geedzoj kunlaboremaj kun respektemo al siaj reciprokaj kvalitoj kaj konoj.

Heidi Baur-Sallenbach ne nur favoris la por-esperantan aktivecon de sia edzo. Ŝi ankaŭ alportis al li siajn fakajn konsilojn, redaktajn helpojn kaj pretis lin anstataŭi okaze de bezono. Tio klarigas la sumon de la por-esperanta laboro, kiun Arthur povis plenumi apud sia profesia redaktora aktiveco tempo-raba.

Pro sia alta aĝo ekde kelkaj jaroj gesinjoroj Heidi kaj Arthur Baur-Sallenbach devis forlasi sian zurikan hejmon por instaliĝi en oldulejo en Männerdorf. Tie ŝi mortis la 15-an de aprilo 2006. Nun ni imagas la tristecon de Arthur restinta sola. Kaj ni esprimas al li la dankemon de la esperantistaro svisa kaj tutmonda pro la efika aktiveco de la paro Heidi kaj Arthur Baur. Dum 40 jaroj per iliaj voĉoj Svisa Radio Internacia esperantlingve diskonigis faktojn pri *la Fenomeno Svislando*.

Ilia radio-kolego Claude Gacond

## Franz Brügger - 1919-2006

Franz Brügger, multjara membro de la Lucerna Esperanto-Societo, mortis la 17-an de majo 2006 en la aĝo de 87 jaroj. Per forta volo li kontraŭbatalis la signojn de maljuniĝo dum longa tempo, ĝis subite lia koro ne plu eltenis la streĉon.

Franz naskiĝis kaj kreskis en Lucerno, pasigis multajn jarojn for de Lucerno pro profesiaj kaŭzoj, sed revenis kun sia edzino kaj kvar infanoj al la regiono en la jaro 1963, kiam dank'al liaj spertoj en la gvidado de homoj kaj streba daŭra lernado li ricevis gravan postenon en la mondfama ŝtalfabrika von Moos en Emmenbrücke kiel ĉefo por la laboristaro, precipe por eksterlandanoj.

Pro tiu laboro li jam tiam ekrimarkis la malfacilaĵojn de diverslingveco en la labormedio. Por pli bone komuniki kun la personaro li ek-lernis diversajn lingvojn, ekzemple la italan, la hispanan kaj eĉ la serbokroatan, ĉar inter

liaj devoj estis ankaŭ la rekrutiĝo de laboristoj en eksterlando. Li instruis la germanan lingvon al la laboristoj en la fabriko kaj kompilis fakvortarojn en la koncernaj lingvoj por faciligi al ili la laboron kaj la ĉiutagan vivon.

Tamen estis nur ĉirkaŭ la jaro 1978, kiam Franz Brügger konatiĝis kun esperanto tra sia najbaro Paul Scherer. Li tuj entuziasmiĝis kaj tiu entuziasmo daŭris dum lia tuta vivo. Li sekvis kurson en la Freizeitcenter Coop, kie li poste dum la jaroj 1983-1986 mem instruis. La lernolibrojn li kompletigis per propre kompilitaj ekzercoj, adaptitaj al la lernantoj, kaj tiamaniere sukcesis formi bonajn esperantistojn, inter ili precipe siajn du filinojn, kiuj kun ĝojo praktikas la lingvon.

Franz Brügger ankaŭ dediĉis sin al la prospero de Lucerna Esperanto-Societo, kies honora membro li estis. Kiel estrarano li dum

multaj jaroj senlace kuraĝigis kaj subtenis la aliajn membrojn en ties laboro per bonaj konsiloj kaj praktikaj solvoj al renkontataj problemoj. Okaze de la regulaj kunvenoj de la membroj li gvidis la paroligajn lecionojn denove per mem aranĝitaj tekstoj, parolekzercoj kaj ludoj. En ĉio tio lia edzino Margrit aktive subtenis lin kiel sekretariino. Ŝi ankaŭ helpis en la ordigo kaj listigo de la societa biblioteko, kiun Franz prizorgis dum multaj jaroj kaj direktis al CDELI, kiam li translokiĝis al pli malgranda apartamento.

Por Franz tre grava laboro por esperanto estis la konigo de la lingvo al la ĝenerala publiko. Li aranĝis radioelsendojn ĉe Radio Pilatus kaj Radio Sunshine kaj distribuis senlace informilojn, propagandilojn kaj invitojn al kursoj.

Sed plej grave antaŭ ĉio estis por li la projekto 'Plano X'. Li firme kredis, ke iun tagon esperanto estos akceptita kiel transnacia

lingvo de la Eŭropa Unio aŭ alia internacia organizo. Per la 'Plano X' li celis certigi, ke je tiu tago estos sufiĉe da kapablaj esperanto-instruistoj disponeblaj.

Menciinde estas ankaŭ, ke Franz Brügger fidele kaj aktive partoprenis en la GERI-aranĝoj de SAEF.

Kie ajn Franz ferie vojaĝis, li ĉiam kontaktis esperantistojn. El tiuj renkontiĝoj rezultis multaj amikecaj ligoj. Kiam esperantistoj vizitis Lucernon, Franz organizis la restadon kaj gvidis ilin tra la urbo.

Al ni, membroj de Lucerna Esperanto-Societo, Franz mankas, sed li restas en niaj memoroj pro la belaj prelegoj pri siaj vojaĝoj, pro sia bona humuro kaj pro la fakto, ke li ĉiam 'pruntis orelon', se iu havis problemon aŭ kaŭzon por plendi.

Lucerna Esperanto-Societo, Lucerno, la 10-an de julio 2006

## Jacques Dovat - 1920-2006

Jacques Dovat naskiĝis la 1-an de julio 1920. Li fariĝis instruisto kaj elektis kiel vivkunulino la koleginon Lucienne Clément, kiun li edzinigis la 29-an de 1944. Ekde tiam Jacques daŭrigis la instruistan funkcion kaj Lucienne ekplenumis patrinan aktivecon.

Sed Lucienne en 1955 eklernis esperanton kaj baldaŭ kun Marc Rorbach eksperimentis la rikmetodan instrupraktikon. Ekde 1980 ŝi estis petata rikmetode prezenti la esperantan vortfaradon en plej diversaj lokoj. Kaj ĉiam sindoneme helpadis ŝin la edzo Jacques, veturigante ŝin, transportante kaj instalante la

instruilojn, kaj precize revenante je la fiksita horo por la rehejmiĝo. Modela helpemo personigis la silentema Jacques Dovat., dank'al kiu Lucienne povis plenumi sian poresperantan aktivecon.

Sed ĉio bedaŭrinde havas finon. La 17-an de aprilo 2006 Jacques forlasis nian mondon. Tamen Lucienne ne perdis la kuraĝon. Ŝi daŭrigas sian instruadon de esperanto nun kun gefila helpo.

Claude Gacond

## Yvon Grosjean - 1942-2006

Pri la grava malsano de Yvon Grosjean, mia edzo (kancero pankreata) ni eksciis la 16-an de marto 2006. Je la 17-an de aprilo li mortis en malsanulejo post tiea sestaga restado. Li estis 63-jara.

Li estis instruisto pri matematiko kaj sciencoj en Le Locle en la sama lernejo kiel mi. Li eksciis pri esperanto en 1985 kaj informis la tutan familion pri tiu mirinda lingvo. Marion kaj mi tiam eklernis ĝin. Pli poste Joëlle, nia dua filino. Mia edzo ŝatis tiam plu studi la japanan. En 2003 li vere komencis studi esperanton por partopreni la Universalan Kongreson kun mi en Götten-

burgo. Li ankaŭ partoprenis Universalajn Kongresojn en Pekino 2004 kaj en Vilno 2005. Li regule frekventis la studsabatojn ĉe CDELI en La Chaux-de-Fonds, eĉ tiun de la 18-a de marto 2006. Li tre ŝatis la kursojn tie.

Do oni povas konstati, ke li alportis esperanton al la familio, do danke al li la svisa esperantistaro iom kreskis !

Mireille Grosjean, Les Brenets.

Aldona noto : Yvon Grosjean naskiĝis la 13-an de decembro 1942 kaj edzinigis Mireille Robert en 1968.

## Margrit Guldin - 1924-2006

Margrit Guldin naskiĝis en Rorschach la 10-an de decembro 1924 kaj mortis en la oldulejo Lentulus en Berno la 30-an de marto 2006. De 1974 ĝis 1984 ŝi mastrumis la kafejon « Tea Room Schär » en Berno je la numero 2 b de la strato Freiburgstrasse. Iom pli frue ŝi esperantiĝis kaj ekde sia instaligo en Berno estas en ŝia restoracio, ke kunsidis la membroj de la Berna Esperanto-Grupo. Tie mi plurfoje havis la okazon prelegi antaŭ grupo de bona dekduo da samideanoj.

Margrit Guldin multe vojaĝis tra esperantio kaj ofte gastigis esperantistojn kaj okaze de la

vojaĝetoj, kiujn ŝi organizis por ili en Svislando, ŝi neniam forgesis direktiĝi al La Chaux-de-Fonds, por ke ili konatiĝu kun la aktivecoj de CDELI kaj KCE, kiujn ŝi malavare subtenis.

La fermo de ŝia kafejo tutcerte signifis krizon por la berna esperantistaro, kiu ne kapablis malkovri same konvenan kunvenojon, kaj Margrit Guldin suferis pro tiu krizo.

Claude Gacond

## André Sandoz - 1911-2006

La 16-an de majo 2006 mortis André Sandoz je la aĝo de 95 jaroj. Naskiĝinta la 18-an de septembro 1911 li aktivis ekde sia juneco en medioj kristana, socialista kaj pacista kaj tiel konatiĝis kaj amikiĝis kun Edmond Privat. Li licenciĝis pri juro en la Neŭŝatela Universitato kaj aliĝis en 1936 al la social-demokrata partio.

De 1949 ĝis 1953 li aŭdigis kun vigla aŭtoritato sian voĉon kadre de la neŭŝatela kantona Parlamento (Grand Conseil), kio kondukis lin al elekto en la neŭŝatela Registaro (Conseil d'Etat) en 1953, kie li zorgis pri la justica kaj industria departementoj. Tiun registaran funkcion li forlasis en 1960 por eniri la Plenuman Konsilantaron (Conseil Communal) de la urbo La Chaux-de-Fonds kiel prezidanto de la urbo. Tiam li ree estis deputitigita al la kantona Parlamento de 1961 ĝis 1981 kaj ankaŭ elekto al la Svisa Parlamento (Conseil national) de 1963 ĝis 1971. Li emeritiĝis el sia funkcio de prezidanto de la urbo La Chaux-de-Fonds en 1970.

Koncerne al esperanto, kiel prezidanto de la urbo La Chaux-de-Fonds, André Sandoz favoris la kreon de CDELI en la biblioteko jam ekde 1956 kaj post la morto de Edmond Privat en 1962 prezidis la asocion « Amis d'Edmond Privat » kaj bonvenigis la ideon de

Yvonne Privat donace direkti al la biblioteko la libron kaj arkivon de sia edzo cele al la kreo de la famiĝinta « Fonds Edmond Privat ». Ankaŭ aktive li favoris kaj prezidis la kreon de Gastejo Edmond Privat (Foyer Edmond Privat) de Kultura Centro Esperantista.

André Sandoz ne mem parolis esperanton, kvankam li estis sufiĉe studinta la zamenhofan lingvon en sia juneco por povi sentraduke sekvi konversaciojn kaj facile legi tekstojn esperantalingvajn.

Inter la kaŭzoj, kiujn la socialisto André Sandoz defendis, estis vigla lukto kontraŭ ĉiuj kontraŭfremdulaj iniciativoj, la defendo de la enmigrintoj, la defendo de la milit-rifuzantoj kaj la ellaboro de civil-serva statuso je la svisa nivelo. Ekde 1970 li kunsidis en la grupo de la saĝuloj prezidata de Max Petit-pierre cele al la solvo de la ĵurasa problemo.

Verkiste André Sandoz skribis humurplenajn kaj sarkasmajn kronikojn ofte sub pseŭdonomoj en la taggazeto *La Sentinelle* kaj regulan kronikon « *Chronique huronne* » kun la subskribo Héraklès de Saint-Yves, per kiu li defendis siajn ideojn kaj humanismon paceman kaj mondanisman.

Claude Gacond

Redaktas : Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9302 Kronbühl, rischneller@gmail.com  
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## Pri interreligia dialogo

*La diskuto pri religia lastatempe fokusiĝis sur la protesto de parto de la svisaj civitanoj kontraŭantaj la konstruon de minaretoj en pluraj komunumoj.*

### • *Laŭ swissinfo kompilis rs*

La statusoj de religiaj komunumoj estas diversaj laŭ landoj aŭ regionoj. Ekzemple en Francio la eklezio estas apartigita de la ŝtato. En la lastaj jaroj oni faris leĝon, kiu malpermesas al muzulmanaj junulinoj porti la kaptukon en publikaj lernejoj. En Svislando tiurilata leĝo ne ekzistas kaj la responsuloj de publikaj lernejoj unuope devas mem decidi pri la sinteno rilate la islaman kaptukon.

En Svislando fakte ne ekzistas kompleta apartigo inter la ŝtato kaj la diversaj eklezioj. La ĉefaj eklezioj (katolika kaj protestanta) organiziĝas memstare laŭ certaj kadraj leĝoj (kiuj povas varii laŭ kantoj !). Tamen ofte la ŝtato (kantono, komunumo) enkasigas la eklezian imposton de la civitanoj redistribuante ĝin laŭproporcie al la religiaj komunumoj. (En kelkaj kantoj vi devas oficiale demisii de via respektiva religia komunumo, se vi ne volas pagi la eklezian imposton.)

La kunvivado de la religioj en Svisio ne ĉiam estas senproblema. Pro la

migrado kaj tutmondiĝo la parto de religianoj nekristanaj kreskis. Grava kaŭzo de la kresko de islamanoj en Svislando estis la militoj en Balkanio, kiuj forpelis centmilojn da rifuĝintoj al la nordo.

Ĉu la ĵus fondita Konsilio svisa de religioj povas havi utilon kaj influon rilate solvon de problemoj de kunvivado de diversaj kulturoj, oni kompreneble ne povas nun prijuĝi. La ideo pri tia konsilio naskiĝis dum porpaca festo kaj kontraŭmilita protesto en Berno antaŭ la komenco de la milito en Irako antaŭ tri jaroj. Oni povas esperi ke ĉi tiu konsilio kontribuos al religia paco kaj havos ian moderigan influon sur la religiajn fundamentistojn kaj ke ĝi interalie publike malestimigas homojn kaj organizojn kiuj misuzas religion pravigante perforton por atingi politikajn celojn. Sed ĝi ankaŭ povos ludi rolon kontraŭ la diskriminacio de la pacema plimulto de la svisaj islamanoj, kiuj ofte estas asimilataj malprave al islamistaj teroristoj.

—oo—

### Forpasis William Auld

La skoto William Auld, unu el la plej eminentaj verkistoj kaj poetoj de Esperanto, plurfoje proponita por la Nobel-premio ekde 1999, forpasis la 11an de septembro 2006.

# Danĝeraj etarmiloj

*La Federacia konsilantaro ĵus rifuzis mocion postulantan ke soldatoj ne plu rajtu konservi sian armilon kun municio hejme. Tio ofendus tradicion de la svisaj civitanoj.*

- *Laŭ swissinfo kompilis rs*

En junio okazis internacia konferenco en Ĝenevo kies centra temo estis « La batalo kontraŭ la uzo de etarmiloj » kadre de la UN-Evolu-programo. Partoprenis delegitoj el 50 ŝtatoj kaj de neregistaraj organizoj. Per fusilaj aŭ pistolaj kugloj, ĵetgrenadoj aŭ minoj mortas ĉiujare pli ol duonmiliono da homoj. La pli multaj mortas en militoj, ducent mil mortas pro krimoj, privataj konfliktoj aŭ pafoj de la polico. Laŭ taksoj de UN ekzistas tutmonde ses cent milionoj da etarmiloj. En multaj landoj la armila per-

forto estas unu de la plej grandaj malhelpoj por sana evoluo. La celo de la konferenco estas adopto de deklaro, kiu devigas la subskribintajn landojn al malpliigo en la uzo de etarmiloj kaj al ties kontrolo. Amnestio Internacia jam delonge postulas ke tiaj armiloj havu devenmarkon kaj estu registritaj.

En Svisio ne ekzistas registro de etarmiloj kaj ĝis nun estis facile akiri armilon de privatulo. Estonte tio eblos nur post oficiala aĉetpermeso. Oni supozas ke ekzistas 1,2 ĝis 3 milionoj da tiaj armiloj ĉe ĉasistoj, soldatoj, sportpafistoj ktp. (16 armiloj por 100 enloĝantoj). Milicanoj povas konservi hejme sian armilon senpage post la deviga soldatservo. En la lastaj jaroj okazis pluraj krimoj per tiaj armiloj kaj ankaŭ memmortigoj. La Ligo de la psikiatroj kaj psikoterapiistoj postulas ke oni malpermesu konservadon de militarmiloj ĉe privatuloj.

## Interesaj retpaĝoj

### **Aktualigo de *www.esperanto.ch***

*Didier Weidmann* renovigis la retejon *www.esperanto.ch* – la kalendaro nun aktualas, la paĝoj modernigis kaj ankaŭ la ĉiutaga retrevuo *Komentoj* (<http://www.esperanto.ch/komentoj>) denove regule estas ĝisdatigita preskaŭ tage. La kunprezidanto de SES petegas vin sendi ĉiujn programinformojn regule al [komentoj@esperanto.ch](mailto:komentoj@esperanto.ch) kaj samtempe volas atentigi, ke SES havas novan retpoŝtadreson, nome [ses@esperanto.ch](mailto:ses@esperanto.ch) Sur la paĝo *www.esper-*

*anto.ch/svislando* vi trovas ĉiujn lokajn grupojn de Svislando. Li ankaŭ dankas vin, se vi lin informas, se iu elemento aŭ hiperkonekto de lia retejo ne funkcias. Tio helpas lian laboron. Li serĉas ankaŭ volontulojn por kunlaboro. Tiaj homoj povas labori de sia hejmo aŭ eĉ en la oficejo en Zuriko.

### **Radioprelegoj**

*Claude kaj Andrée Gacond* dum tridek jaroj (1962-1992) okupiĝis pri esperantaj elsendoj de la Svisa

kurtonda Radio. Kun Stefano Keller ili nun komencis enretigi radioprelegojn kaj parton el ili eblas jam nun aŭskulti se sonkopio ekzistas. En kontraŭa kazo oni povas elŝuti kaj legi la tekstojn. La prezento de la retpaĝo estas en prilaboro, sed ekzistas jam du indeksoj por atingi la diversajn fakojn. Malgraŭ ke la situacio estas ankoraŭ provizora, ĉar nur eta parto de la 2000 (!) prelegoj estas arkivitaj, pluraj interesaj prelegoj estas aŭskulteblaj.

(<http://www.esperanto-gacond.ch/radioprelegoj.html>)

### Novajoj sur *plansprachen.ch*

Oni trovas nun la lastatempe aperintaj libroj pri interlingvistiko kaj esperantologio (inkl. de historio pri la esperanto-movado kaj lingvopolitiko en esperanto). La apero de la libro « Universalaj lingvoj en Svislando » estas anoncita por septembro 2006.

## « Don Karlos » de Friedrich Schiller

*Ĉi tiun dramon poemon en blankaj versoj de Schiller tradukis kaj eldonis Willy Nüesch, Berno 2006.*

- *Richard Schneller laŭ teatroprogramo*

Kiam Friedrich Schiller komencis verki en 1782 « Don Karlos » (1787) li estis 23-jara.

En Eŭropo la ideoj de la racionalismo disvastiĝas, la krio por libero kaj justeco fortiĝas kaj la malnovaj politikaj cirkonstancoj ŝanceliĝas.

La historia fono de la dramo estas la liberiga batalo de Nederlando kontraŭ Hispanio : reformacianoj batalas kontraŭ la katalika Hispanio dum la tempo de la inkvizicio.

Komence konceptita kiel familia kaj ama dramo la ŝtofo ŝanĝiĝos al aktuala idea dramo politika pri la strukturo de la potenco.

Profunda amikeco ligas Karlos, la kronprincon, al la Markizo de Poza, malta kavaliro. Kiam Poza revenas el Nederlando kaj rakontas la terurajn tieajn cirkonstancojn, li trovas Karlos senesperan : ĉi-lasto amas sian duonpatrinon Elizabetan de Valois unue al li promesitan, sed kiu devis edziniĝi al la patro de Karlos, Filipo la IIa, reĝo de Hispanio. Ĉar la amon kontraŭstaras legitimaj postuloj de ŝtataj interesoj, ĉiuj membroj de la reĝa familio venas en nesolveblan konflikton. Poza

volas venki ĉi tiun streĉitecon, li postulas de la ŝtato ke li servu la homon : penslibero



gvidu lin al si mem. Sed kiam li celas konkretajn projektojn, liaj agoj iĝas ambiguaj kaj la reĝo sentas sin trompita. Fine la reĝo devas transdoni sian propran filon al la inkvizicio kaj per tio li iĝas tragika figuro.